

# La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.*

**Redakcio-Administracio :**

Box 731, Elizabeth-str: P.O.,  
Melbourne (Aŭstralio).

**Abono (por dek du numeroj) :**

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 penceoj.  
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 penceoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 53

Melburno (Melbourne), Australio.

10 novembro 1924.

## XVth UNIVERSAL CONGRESS OF ESPERANTO AT VIENNA.

Our report last month dealt with the chief items of the first few days of the Congress and necessarily omitted several interesting ones. On Friday, 8th August, a lantern lecture was given on "Max and Maurice," the types of urchin created by the famous German humorist, Wilhelm Busch, and a visit took place to the one-time summer residence of the Austrian Emperors, Schonbrunn Castle. In the evening loud-speakers were set up at the Konzerthaus where the Congress members listened to speeches made at the Vienna Broadcasting Station by Esperantists of different nationalities, each speaking in his national tongue and in Esperanto. These speeches were followed by orchestral music, etc. It is interesting to us to note that many of those at this meeting listened to broadcasting for the first time, for many were drawn from countries where private radio apparatus is still forbidden.

On Saturday, 9th August, a Tablet was inaugurated to the memory of Dr. Zamenhof, author of Esperanto, the speakers at the ceremony being Messrs. Schroder (Austria), Bujvid (Poland) and Privat (Switzerland). The Tablet was affixed to a house in which Dr. Zamenhof stayed during 1886 and 1897.

On the Sunday evening the Viennese Choral Society, accompanied by a Symphony Orchestra, introduced the visitors to the musical life of Vienna in a Concert that was typical and that enthused everyone in the vast audience. The inevitable Cabaret presentation followed elsewhere.

Monday, Tuesday, and Wednesday mornings were devoted to the great business meetings of the Congress, where the rank and file of the Movement had their opportunity to make recommendations to the official institutions after receiving the reports for the year. On the Monday afternoon a great Pacifist Demonstration, in German and Esperanto, was held, attended by many of the Congress members and by numbers of the citizens of Vienna. Messages were read from the President of the Austrian Republic, Ministers of State and others, and also from pacifist organisations throughout the world. The meeting was presided over by Mrs. Julia Isbrucker and the enthusiasm was immense. In the evening a Concert was given by blind Esperantists, and, in addition, a first performance of Raimund's "Malŝparulo" (The Spendthrift) took place at the Burgetheater. On this play, a second performance of which was given the following evening, a considerable sum of money had been spent. The scenery and staging were delightful, but owing to the high price of the tickets,

many of the visitors from countries with unfavourable exchanges were unable to afford to be present, and it is doubtful whether it was wise to spend so much on the production. The actors and actresses interpreted the parts well and deserve every praise.

On the Tuesday afternoon a large party went for a trip by steamer on the Danube and received a good idea of the size and importance of this great waterway. On the Wednesday evening at a Garden Party the visitors from all parts of the world commenced the great leave-taking, when the words on the lips of everyone were "Until next year." Many remained, however, for a day excursion to Semmering de Sudbahnhof on the Thursday, while others started for after-Congress excursions to Prague, Budapest, etc.

And now the tale is told. Each reader can gather his impressions from the events described in this report, the busy days condensed into too few pages, and can form his conclusions as to the spirit of the Esperanto Movement, where men and women of all races, creeds and opinions can gather together on a basis of neutrality, and, working in harmony one with another, can help forward the day when knowledge and understanding shall have destroyed distrust and suspicion, leaving the nations with thoughts of peace and goodwill one to another.

Next year a great gathering of Esperantists will take place in Switzerland, and in 1926 Great Britain will extend her hospitality to the Congress.

### ESPERANTO KAJ TELEGRAFO.

La Aŭstraliaj telegrafistoj ĉe konferenco malakceptis la proponon de la poŝta federacio de Francujo, ke Esperanto estu akceptita, kiel internacia telegrafa lingvo. La konferenco opiniis, ke ĝi ne estas kompetenta trakti la demandon, escepte teorie.

### ANONCOJ.

S-ro Cornelius Ney, "The Eirie," Blue St., Nth. Sydney, N.S.W., Australia, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun kolektantoj de ĉiuj landoj.

S-ro M. J. Ravelick, G.P.O., Auckland, New Zealand, deziras korespondi per letero aŭ poŝtkartoj kun ĉiuj landoj.

### LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ 1924.

La deka festo de la Internaciaj Floraj Ludoj, kiujn aranĝis la Kataluna Esperantista Federacio, okazis la 8-9-10 junio, kaj, kiel ĉiam antaŭe, ili estis tre sukcesplenaj.

Inter la programeroj estis Esperanto Diservo en la arta preĝejo "L'Escorial," kiam kvar pastroj partoprenis. Pastro profesoro Casanovas faris predikon sur la temo "Irante tra la tuta mondo prediku Evangelion al ĉiuj kreituloj."

La Vika teatro estis plenplekta, kiam la Ludoj mem komenciĝis. Ili atingis grandan internaciecon provis la 145 verkoj el 16 landoj ricevitaj por la konkurso.

La poeto premiita estis s-ro Kolmano de Kalocsay, el Budapeŝto, per la jena versaĵo, titolita.

### KISOJ.

Mi kisas vian manon:  
Patrinon kisas fil' . . .  
Estim'. Respecto pia.  
Humil'.

Jen kis' al viaj haroj:  
De patr' al filinet' . . .  
Dorlot'. Fier' naiva.  
Kviet'.

Mi kisas vian frunton:  
Fratinon kisas frat' . . .  
Fidela ŝirm'. Kareso  
Kaj flat'.

Jen kis' al via vango:  
El kamarada kor' . . .  
Komunaj zorgoj, ŝercoj.  
Humor'.

Mi kisas vian buŝon . . .  
Mallumo. Fulm'! Destin'!  
Turmento! Rav'! Komenco  
Kaj Fin'!

Pro tio li povis nomi Fraŭlino Messerrat Terricabras Fatjo Reĝino la Ludoj. Inter la gajnintoj de aliaj premioj estas Pastro Josep Casanovas, traduko de Kataluna prozo "La Blanko Gurgo"; s-ro Jakob Schmid, el Bern, originala versostudo pri la legendo de la Sankta Gralo; s-ino E. L. Osmond, el Londono, originala verko, komparo de Dikihoto kun la angla "Utopio," Thomas More; s-ro Marian Sola, Terrassa, traduko de "La Neforteco," de Maeterlinck.

En la tradukitaj versaĵoj sekcio gajnis premiojn f-ino Louise Briggs, el Armley, "Legendo bela," de Longfellow, kaj "La Forlasita Vilaĝo," de Goldsmith); s-ro W. Solzbacher, el Honnef, ("Mahabharata"); s-ro Edouard Jung, el Strasbourg, ("La Militista Marsalana"). Premiojn ankaŭ gajnis aliaj verkistoj, nome, s-ro H. A. Luyken, ("Rakonto de maljuna klubano"); s-ro J. Berger, el Cordoba, ("Montoj kunigas"); s-ino E. L. Osmond, ("Finn Mac Cumhail"); s-ro E. Fethke, el Bydgoszcz, ("Eloe"); s-ro Ivan Krestanoff, ("Bulgaraj popolaj kutimoj"). Multaj el la suprecititaj gajnis aliajn premiojn en diversaj sekcioj. Donus ĝojon povu legi ĉiujn verkojn.

Kataluna Esperantisto eniris en sian trian epokon kaj el ĝia bonega raporto estas ĉerpita ĉi tiu priskribo. La fervoraj, laboremaj kaj talentoplenaj anoj de la Kataluna Federacio meritas la dankojn de la tuta Esperantistaro kaj la rekompenson vidante ilian gazeton regule aperadi dum venontaj jaroj.

### TRADUKA GRUPO.

In view of the coming Congress, Esperantists are informed that there are still vacancies in Mr. G. Gordon's Traduka Rondo. There are enthusiastic members in all the states and the facility with which former indifferent Esperantists now speak and write the language is part of what Mr. Gordon's Translation Class will do in a few months.

The cost is 1/- per month pre-paid by open postal notes and two stamped envelopes, a mere bagatelle which can even be reduced by two or three people combining to get the papers together through one of their number; or New Zealand members will be allowed to send their translations direct to Mr. Gordon.

The procedure was fully explained in July "Suda Kruco." Further particulars may be obtained from the Hon. Sec., Miss B. K. Blyth, 10 Victoria Avenue, Surrey Hills, Vic.

### RECENZOJ.

**TRI NOVELOJ.** A. S. Puŝkin, el la rusa originalo tradukis doktoro Andreo Fiŝer. Vol. 10 Internacia Mondliteraturo de Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig. Prezo 1\$ 6d.

En ĉi tiu libro estas tri noveloj, kiuj bone tenas la intereson de la leganto. La unua—"Pikreĝino"—estas historio de tre maljuna nobelulino, pri kiu nepo rakontis al kartludantoj, ke ŝi posedas rimedon por ĉiama gajno. Tiu vekis la avidecon de certa oficiro, kiu, post multaj ruzaĵoj por malkovri la sekreton, unu nokton tiel timegis la maljunulinon, ke ŝi mortigis. La oficiro, post ĉeesto je la enteriĝo, senespere iris hejmen. Dumnokte la ombro de la nobelulino aperas antaŭ li kaj klariĝas la ludmanieron. La fantomo nomis tri kartojn kaj certigas, ke se la ludo estos farata po unu karto dum tri sinsekvaj tagoj, gajno estos certa. La unua provo por granda sumo sukcesis, la dua por pli granda sumo sukcesis, la tria kun la gajno de la du antaŭaj malgajnis. La ludanto fremzigiĝis kaj en malsanulejo ĉiam murmuretas, tre rapide—Trio—Sepo—aso.

"Negblovado" estas priskribo de romaneca edziĝo, post kiu la geedzoj disiĝis kaj nur hazarde, sed al ilia ĝojo, reunuiĝis post multaj jaroj. "La Paf" estas rakonto pri duelo, senerara pafisto, kiu dum jaroj ekzercis sin kun la nura celo mortigi la kontraŭulon kiam li, la duan fojon, staras antaŭ sian pistolon. Kiam la oportuno sin prezentis li, post petegoj de la edzino de la kontraŭulo, kaj post montrado de sia mirinda lerteco, lasas al la malamiko la vivon kaj feliĉon dum li mem trovis la morton sur batalkampoj de fremdlando. La Puŝkin'a heroo estis pli bonŝanca ol Puŝkin mem; ĉar la genia verkisto mortigis en duelo en 1837.

La traduko de Andreo Fiŝer, lingva komitatano, estas unuaranga kaj aldonita plezuro al la kritikema leganto estas la korekta Zamenhofa

## HAROLDO PUDNEY

## Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM Aŭ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

interpunkcio, kiu, bedaŭrinde, ne ĉiam troviĝas en ĉi tiu serio. (C.W. B.)

**ABISMOJ**, romano originale verkita, Jean Forge. F. Hirt & Sohn. Prezo 2ŝ 0d.

**SALTEGO TRANS JARMILOJ**, romano originale verkita, Jean Forge. F. Hirt & Sohn, Prezo 5ŝ 3d.

Nova stelo ekbrilegas inter la Esperantista stelaro, Jean Forge, la verkisto de ĉi tiuj du romanoj. "Abismoj" estas amrakonto, kies kompleto disvolviĝas laŭ tradiciaj paŝoj. En Anglujo kaj supozeble en ĉiu alia lando ĉi tiu speco de romano trovas tre volontajn legantojn, kaj estas neniam kialo por timi, ke estos alie en Esperantujo.

"Saltego trans jarmiloj" estas fantazio, similaj al tiuj, kiuj abundas en ĉiu lando, sed la temo estas vere originala kaj estas prezentata en tia verŝajna formo, ke la leganto ne vole demetas la libron ne ĝin fininte. Sed rilate ĉi tiujn librojn ne la temoj, sed la lingvaĵo estas la rimarkinda afero. La aŭtoro diras, ke li skribis ilin en la Esperanto de la 1887 jaro, kaj ke li speciale klopodis ke la libroj estus facile kompreneblaj por ĉiuj. Li bone sukcesis kaj ĉiu reformemulo devus konvinkiĝi, ke Esperanto ne bezonas iajn "plibonigojn." Tamen iuj vortoj ne troviĝas en "Mildige"; nome, "orkanon" (pg. 12), "alklifigo" (36), "impete" (38), "kikerikas" (88), "riveli" (130), "infulo" (136), "gulaŝo" (145), "amplo" (157), "halicina" (163). Trafaj esprimoj estas, "La krio . . . elektras min" (62); "Tabakaĉ . . . riverencas . . . kaj -pafas sin for!" (68); ". . . opinii, ke tiu ĉi famo estas infana rakonto transmonta" (156). Ĉu estas korekta, "Miaj kara" (34); "shoking" (48); "virgino" (48); "Mi estas naturo trankvila" (127); "Kelkiu loko" (116)? "Matildo" (64) ŝajne estis skribita erare anstataŭ "Kamilo."

Ĉu estas permesate esti sciavida pri la personeco de "Jean Forge"?

Oni ŝatus scii ĉu la nomo estas nun plumnomo, kaj en kiu grupo la verkisto akiris lian bonan scion de bela lingvo. (C.W.B.)

**PREPARAĴOJ DE TUTMONDINTERESAJ KONATAJ MEDICINAJ PRODUKTOJ**. Burroughs Wellcome & Co., Snow Hill Building London, E.C.

Interesa informo pri la preparado de ĉi tiu mondkonata firmao. La unua broŝuro estas intencita por legado de Esperantistoj. Ĝenerale, la dua estas difinita sole por kuracistoj. La firmao volonte sendos ekzemplerojn de la unua al iu ajn leganto, kaj ekzempleron de la dua al iu ajn kuracisto, kiu ilin petos al ili.

**INTERNACIA ESPERANTO LUDKARTARO**. Aŭtoro Alfred Lombos, "IEL" kartcentrejo, Kest 11, Poŝto 112, Budapeŝt, Hungario.

La aŭtoro konstruis por la propagando de Esperanto tre oportunan kartludon kune kun originalaj ludkartoj. Unu kartpaketo konsistas el 54 karto kaj ludregularo. La karto estas lukse preparitaj, tre belaj kaj tre interesaj. (Geografiaj, etnografiaj kaj heraldikaj emblemoj.) La kartaro estas taŭga por speciala pacifista ludo kaj per ĝi estas la plej multe da konataj kartludoj ludeblaj. Tiu ĉi Internacia Esperanta Ludkartaro estas la plejbona esperanta propagandilo ankaŭ inter neesperantistoj.

Unu kartpaketo kostas kune kun instrukcio kaj afrankita rekomendo poŝtendo: fundamentprezo, simpla po 4.—; luksa po 5.— svisaj frankoj aŭ egalvaloro.

**INTERNACIA KOMERCO ADRESARO "PER ESPERANTO"**. Eldonita de Rudolf Hoschek, Vieno XVII/1, Muglendergasse 6.

Ĉi tiu estas la unua komerca adresaro. Estas surprize, ke la adresaro estas relative malgranda, ĉar tiu senpage estas akceptitaj la necesaj informoj. Dua eldono, jam nun estas preparata, kaj estos kuraĝigita al la eldonanto se la alsendo de multaj adresoj devigos lin presigi.

## GLUMARKOJ for your correspondence. GLUMARKOJ

A new and original design in two colours. Distinctly Australian.  
SIXPENCE PER PACKET OF 25.

The entire proceeds will be donated to the fund of the 5th Australasian Congress, Easter, 1925, Melbourne.

Secure your ticket for the congress early: Hon. Librarian, Melbourne Esperanto Society, Box 731, P.O., Elizabeth Street.

novan libron en almenaŭ duobla amplekso.

**OFICIALA ALMANAKO** de la "Tutmonda Polica Ligo," kun 70 ilustraĵoj. Eldonis "La Policisto," Budapeŝto, Hungarujo.

Tre interesa kaj utila libro por policistoj. Donas historion de la Esperantista Polica Movado, ĝia organizaĵo, programo, statistiko kaj foto-grafaĵoj de policaj ĉefoj de multaj landoj.

## KRONIKO.

**Sidnejo, N.S.K.**—Daŭrigante la regularajn jaŭdajn kunvenojn la Sidneja Esperanto Societo okazigis paroladojn kaj amuzaĵojn kiel jene:—

Septembro 4—S-ro D. Healy liveris bildlanternan lekcion pri la bela sudmara insula "Hawaii," donante tre interesajn priskribojn pri historio, topografio, vivo, moroj kaj moderna progreso sub Usona standardo. La klišoj, pruntitaj de la loka Hawaii's Turista Oficejo, multe helpis montri la belecon de priparolitaj temoj.

Septembro 11—Muzika kaj deklama vespero organizita de Fraŭlino Violet Fairfield.

Septembro 18—Interpretista vespero. Tiel nomita ĉar kvin naciaj lingvoj estis parolitaj de diversaj membroj kun akompanitaj esperantaj respondoj de aliaj anoj. Sufiĉe interesa eksperimento.

Septembro 25—Malnova, sed neofte vidata samideano, S-ro A. M. Davidson spirite kondukis la klubanojn al la regno de revoj kaj per gajaj kaj seriozaj diroj sukcesis teni ilian atenton ĝis post la kutima horo por iri hejmen.

Oktobro 2—"Ĉu Esperantistoj devus klopodi por forigi naciajn lingvojn?" estis la temo de debato kondukita de S-ro V. Rutland (por la forigo) kaj S-ro. L. E. Fosto (kontraŭ forigo). Bonaj argumentoj estis prezentitaj ambaŭflanke kaj la aŭdantoj devis mem juĝi kion subteni.

Oktobro 9—S-ro G. Winter donis instruon paroladon pri "Evolucio" kun aldono de klarigantaj bildoj per lanterno. Pro longeco kaj diverseco de tiu temo, nur la unua parto povis esti pritraktata kaj la dua sekvis post kelkaj semajnoj.

Oktobro 16—Fino Martha L. Root,

Usona ĵurnalistino kaj vojaĝistino, alparolis la membrojn pri ŝiaj mondvojaĝoj kaj renkontoj kun Esperanto, pri kiuj estas aliloke raportata.

Oktobro 23—Svisa samideano, S-ro Ernst Bachmann, buŝe kaj bilde klarigis la nekompareblan belecon de "Svislando," kiu havas por Esperantistoj ĉiaman intereson. (Klišoj affable pruntitaj de Svisa Konsulejo).

Oktobro 30—Socia vespero. Samideanoj kiuj jam delonge ne vizitis la klubon estis speciale invitataj ĉeesti kun rezulto, ke multaj malnovaj vizaĝoj estis reviditaj kaj anekdotoj el antaŭaj jaroj interŝanĝitaj ĉe tabloj kun teo kaj kuko.

**Melburno, V.**—La jarkunveno de Universala Esperanto-Asocio havos lokon ĉe Hardware Club Chambers, 350 Little Collins St., vendrede la 28an novembro je la 8-30 horo. La ĉefdelegito urge petas la ĉeeston de ĉiu ano. Post la formalaj aferoj de la vespero sekvos kantoj, kaj aliaj amuzaĵoj.

A performance by children of "Cinderella," and a play entitled "Sitting it out," all in Esperanto, will be held on December 15th at Queens Hall, Collins Street, Melbourne. Proceeds to go to the Congress Fund.

## AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 30 oktobro ni ricevis la jenajn sumojn:—Nigra Cigno Grupo, 5/6 aŭgusto '25; P. Redenz, 5/-, oktobro '26; V. Irwin, 4/6, aprilo '25; C. Nye, 5/6, septembro '25; F. T. Byatt, 4/6, septembro '25; Coles Book Arcade, 15/-, aŭgusto '24; M. Miller, 5/-, junio '25; P. Abbott, 4/6, junio '25; Redcliffs Pty. Ltd., 17/6; E. Forshaw, 4/6, aprilo '26; Hobarta Esperanta Grupo, 5/6, aŭgusto '25, donaco 10/-; Kontantaj, 7/8, s-ino Stoke, 4/3, septembro '25; S-ro Dadswell, 4/6, aŭgusto '25; The Chocolate Bowl, 15/-.

## GAZETOJ RICEVITAJ.

Arguso, n-o 2; Amerika Esperantisto, n-o 3; British Esperantist, n-o 233; Esperanto Triumfonta, 206 ĝis 209; Export Esperantist, n-o 7-8; Internacia Komercio, n-o 15; Informservo de la Internacia Labora Oficejo, 66, 68; Le Monde Esperantiste, n-o

3; La Revuo Orienta, n-o 9; Norvega Esperantisto, n-o 1—2; Pola Esperantisto, n-o 8; Volker Spiegel, n-o 14, 15.

## LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata sinjoro,

Antaŭ nelonge la vaporŝipo Douglas Mawson estis marrompita ĉe la golfo de Carpentaria, kaj laŭ oni diro de la indigenoj, kaj ankoraŭ restas tie malliberigitaj, sed pri tiu ĉi famo, s-ro J. J. Waldron, kiu jam vojaĝis kvin fojojn de Adelaide al Darwin, kaj antaŭ nelonge revenis de la golfo de Carpentaria, diras, ke laŭ lia opinio, se iu sukcesis surbordiĝi ĉe la Golfo, kun posedaĵoj kiujn la indigenoj dizeregis havi, ili certe estus mortigitaj, kaj certe ne restus postvivantojn. La indigenoj tute ne posedas ideon pri mallibereco, Europeaninoj estus nur ĝenaĵoj por la indigenoj, ĉar ili nek povas marŝi tra la malfacile tra irebla lando, nek povas nutri sin per la nutraĵo de la indigenoj.

S-ro J. J. Waldron estis unu el la partio, kiu partoprenis la Aŭstralian federacian esploron en 1811-12, kaj vojaĝis de la sudo ĝis la nordo, kaj fine kamplokiĝis ĉe Barrooloolo, kaj de tie, la insuloj de la Golfo, la marbordo de la bela McArthur rivero, kaj la ĉirkaŭaĵo estis termezuritaj, kaj esploritaj, kaj li jene priskribas la Golfan distrikton. Ebena rokhava marbordo, danĝerplenaj manglaĵmarĉoj, el kiuj venas milionojn da moskitoj, grandaj riveroj ĉirkaŭitaj de tropikaj densejoj, herbmalriĉaj ebenaĵoj, kie sin nutras sovaĝaj bubalaroj, estas la notindaĵoj de la lando, kie ankoraŭ loĝas kelkaj el la restantaj gentoj de la rapide forpasantaj Aŭstraliaj indigenoj.

Kune kun la indigenoj de la Kimberley distrikto, Bathurst, kaj Melbourne insuloj, la Golfaj indigenoj estas la plej bonaj specimenoj de la Aŭstraliaj indigenoj, korpe ili estas grandkreska, kaj ambaŭ la viroj kaj la virinoj estas altaj pli ol ses futoj, kaj la videblan intermiksion de Malaja sango, klarigas ilian inteligenteco.

La nutraĵo abundas en tiu ĉi indigena paradizo, kaj la tieaj indigenoj posedas malmulte da la malvirtoj, kiuj kutime venas post kontakto kun civilacio, senvenas kaj feliĉe ili vivadas, kiel ili jam vivadis dum sennombraj jarcentoj, tre malofte vidante la blankhaŭtulojn. Ili vagas tra la lan-

do, kien plaĉas al ili, escepte ke unu gento devos ne trudi sin sur la landon de alia gento, la neskribitaj landlimoj estas zorge evititaj, kaj se ili ne farus tion, batalo estus la rezulto.

La preferata sporto de la viroj estas ĉasi la bubalojn, sed kutime ili ĉasas nur por nutri sin. Mankas al ili ĉevaloj tial ili devas steliri malrapide kaj zorge . . . ĉar la bubaloj estas timaj, ĝis kiam neeble estas forkuri . . . kaj per lanco mortigi malbonŝancan bubalon, kiu vagis tro malproksime de la aro.

La Gola distrikto estas nur iomete esplorita kaj neniu povas diri, kiom da indigenoj loĝas tie. La gentoj ofte nombras 80 ĝis 150 anojn. La gentoj ofte kvarelas inter si, sed evitas la mortbatalojn, kaj la vundoj ricevitaj kutime estas nur frakasetaĵoj kapoj, kaj negravaj lanciaj vundoj. La indigenoj pli preferas naĝi ol batali. Ili naĝas tre bone kaj ofte restas duontagon en la varma akvo de la Golfo, serĉadante por la mituloj kaj aliaj frandaĵoj.

La moralaj leĝoj estas tre rigoraj kaj ofendintoj estas mortpunataj. La ofendinto forkuras de la lando de la gento, sed tre malofte evitas la nelacigeblan postkuron de la venĝantoj. En ia senhoma loko li estas mortigita. La plej grava ofendo kontraŭ la moralaj leĝoj estas la edziĝo inter parencoj. Por malhelpi tion la gentoj estas dividitaj en grupojn, nomitaj laŭ birdoj kaj animaloj. Ekzemple, (Wallaby) valabiaj viroj kaj kanguruaj virinoj, igvanaj viroj kaj lacertaj virinoj. Ĉar ili estas kuzoj la valabioviroj kaj la kanguruvirino ne povas edziĝi, sed valabioviro povas edziĝi kun lacerto-virino.

Per tiu simpla metodo genta kroniko estas rememorigita al ĉiu, kaj oni scias la parencecon de la anoj, kaj la problemoj de samsangeco estas solvitaj.

Unu vesperon, kiam li kamplokiĝis sola proksime al la Barrooloolo rivero s-ro Waldron vidis indigenan virinon kaj viron alproksimiĝante. Li iris por renkonti ilin. La virino ne povis paroli angle, sed la viro sukcese komprenegis sin post multaj penoj. Ili estis kuzoj, kaj amis unu la alian malobeis la gentajn leĝojn, kaj forkuris. Ili jam marŝis 200 mejlojn de la distrikto de sia gento, kaj si trovus en danĝera situacio, ĉar ke ili kaj mejloj al la sudo troviĝas distrikto de malamika gento, kaj se i-

iros tien, ili estos mortigitaj, se ili restis, kie ili estis, ili certe estus mortigitaj ĉar la venĝantoj proksime postkuris ilin.

Ĉiu amas la geamantojn, ĉu ili estas nigraj aŭ blankaj, kaj la paro tiel amis unu la alian, ke s-ro Waldron ne povis rezisti la tenton helpi ilin. Li lasis ilin resti ĉe lia kamploko dum kelkaj semajnoj, kaj pro tio ili estis tre dankaj. Li instruis la virinon lavi la manĝilaron, kaj dum ŝi laboris la viro restis proksime, kaj penis helpi. Pro maller-teco ili rompis ĉion, kio estis rompebla en la tendo. Ili estis tiel nai-vaj, ke unu tagon s-ro Waldron trovis ilin tremadante pro timo de viandpecetiga maŝino. Eĉ post li dispecigis la aferon, ili refuzis proksimiĝi al la manĝajkesto sur kiu ĝi kuŝis.

Kiam s-ro Waldron sciigis, ke ŝargveturigisto estas venturante sude al Camooweal, li rajdis 30 mejlojn, al la brutvojo, kaj havigis por la geamantoj kunvojaĝanton. Kion okazis al ili post tio, li ne scias, sed estas dube ĉu ili longe vivis. Du tagoj post ili forlasis s-ro Waldron, du batalistoj de ilia gento militarmita, preterpasis en postkuro de la ŝargveturilo.

Religio tute mankas al la indiĝenoj, superstiĉoj regas iliajn vivojn. Esti "boned" (malbenita,) estas morti. La indiĝeno kiu volas malbeni iun pro ia ofendo, steliras al la kamploko de lia viktimo dum krespusko montrante je li du pinthavajn ostojn, kaj kantas terurigan malbenon. La malbeno estas tiel efika, ke la viktimo tre malofte povas sin savi.

S-ro Waldron spertis rimarkindan pruvon de tiu kruela superstiĉo. Dum li vojaĝis trans la sudon de Arnheim distrikto, lia plej bona indiĝena knabo, subite rifuzis manĝi. Li diris, ke li estis "boned," kaj kvankam li estis kompare inteligenta, li estis certa, ke li devos baldaŭ morti. S-ro Waldron havis paron da montrantaj ostoj, donacitaj al li de la sudaj indiĝenoj. Ili kutime estas faritaj el

la ostoj de la postkuro de kanguruoj glatigitaj kaj pinthavaj je unu fino. Li penis konvinki la knabon, ke ili estas tute sendanĝeraj, sed la malfeliĉa knabo, fariĝis eĉ pli tima, kaj forlasis la kamplokon. Baldaŭ poste li mortis de timego kaj malsato.

Kun amika saluto, via fidele, P. H.

## SPREADING ESPERANTO.

### Interest by Rotary Clubs.

The growing interest in Esperanto was emphasised by the president of the British Esperanto Association, Mr. John Merchant, in a recent article in which he said: "The different Rotary clubs become more and more interested concerning Esperanto. Lately Mr. Rhodes Marriott spoke about this before the Rotary Club in Buxton. I myself made a similar effort in Sheffield, Wakefield, and Doncaster, and hope to go to several more towns in the immediate future. Very good reports have followed all the speeches. One result of the reports is that I have received an invitation to write an article of 2000 words for the International Rotary of Chicago, which has more than 100,000 readers. The editor has written that my article is quite suitable and will appear as soon as possible, and that he himself is very desirous of helping the reception of Esperanto in all Rotary clubs, so that they can more easily spread their ideals throughout the world.

(New Zealand Herald, June 16, '24).

## ALVOKO AL LA ESPERANTISTOJ

Je la lastaj tagoj de la venonta Decembro la Esperanta Grupo de Udine (Italujo) inaŭguros sian propran flagon. La ceremonio okazos en la ĉefa teatro de Udine, antaŭ la invitataj aŭtoritatuloj kaj ni esperas per tio kiel eble plej interesigi kaj disvastigi nian aferon inter la udinanojn.

Estus nia varma deziro ricevi de ĉiuj Grupoj, Asocioj kaj individuaj esperantistoj salut-leterojn, kiuj estos

## VITAMIN.

Nature's remedy for physical and nervous exhaustion and disorders.

See Testimonials.

For Children and Adults.

Price Per Packet: 3/8 Posted.

Australian Agent: A. R. COHEN, 12 DERBY STRET, KEW.

legotaj al la partoprenontoj.

Helpu, do, gesamideanoj, sendante tuj aliĝojn al la suba adreso kaj ricevu por tio la plej korajn salutojn kaj dankojn de la Esperanto Grupo "Caffe Roma" Udine (Italujo).

### KONGRESAJ AFEROJ.

La jenaj sumoj estas ricevitaĵoj de la kongresa kasisto. Kongresaj pagoj:—n-o 20, f-ino Schmetzer, 21/6; n-o 47, E. Godfrey, 6/-; n-o 48, L. Walford, 5/-; n-o 39, s-ro Phillips, 10/-; n-o 49, R. Jones, 10/-; n-o 50, A. McKenzie, 21/-. Donacoj:—Walking Club, 18/6; Glumarkoj venditaj, 16/6; Camberwell dance, £7; Melbourne Esperanto Club Social, £7/17 6; Raciista Grupo lekcio, 17/1.

**GRUPOJ FILIIĜITAJ AL A.E.A.**  
(Prezidanto: sinjoro F. V. Taylor, Sidnejo, N.S.K.)

**Sydney: Esperanto-Societo.** Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.30—10 p.m. ĉe "Station House," Rawson Place (6a etaĝo). Guste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; sekretario, S-ro L. E. Fosto, adreso. "The Brighton," Croydon Park, Sydney.

**Melburno Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro C. L. Clarke; sekretario, s-ro J. G. Robert. Poŝta adreso, Box 731, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Hardware Club Chambers, 350 Little Colling-st., vendrede vespere, je la oka horo.

**A.N.A.-Grupo, Oakleigh.** Prezidanto: sinjoro W. Quinlivan; sekretario, sinjoro D. Thomson, poŝta adreso: ĉe British Imperial Oil Co., 153 William-str., Melbourne. Kunvenejo: Mechanics' Institute, Oakleigh, lunde vespere je la oka horo.

**Brisbane Esperanto Club.** Sekretario S-ro A. J. Sycamore, C/- Mr. W. Hartley, Carlton St., Highgate Hill, Sth. Brisbane. Address enquiries to Secretary, who may be seen between 12 noon and 1 p.m. at Murray Fraser Ltd., Charlotte St., City.

**Berwick: Esperanta Grupo.** Kunvenejo kaj poŝta adreso: ĉe F-ino P. Abbott, "Chelsworth," Normanby Rd. Berwick, merkrede je 3.30 p.m.

**Dargaville: Esperanto Societo.** Prezidanto, S-ro Alfred Gregory. Sekretario, S-ro R. Pope. Poŝta adreso, P.O.; Dargaville, N.Z. Kunvenejo: la legosalono de S-ro A. Gregory, vendrede vespere, je la sepa.

**"Iru Antauen"-Grupo.** Prezidantino S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunvenejo: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere je la oka horo.

**"Nigra Cigno"-Grupo.** Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str., Victoria Park, W.A. Kunvenejoj vespere je la oka horo "Perth Academy," komencantoj merkrede; progresintoj, 9 Pier-str: ĵaŭde

**Persista Grupo, Armadale, Melbourne.** Prezidanto: S-ro H. Byatt. Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunvenejo kaj poŝta adreso, 62 Northcot Rd., Armadale, merkrede vespere, je la oka horo.

**Whangarei Grupo Esperanta.** Prezidanto, S-ro D. Tilly. Sekretario S-ro Chas. Waymouth. Poŝta adreso ĉe S-ro Chas. Waymouth, strato Manse, Whangarei, N.Z. Kunvenejo: La domo de S-ro Tilly, strato Water Whangarei, vendrede, je la oka horo vespere.

**Raciista Esperanta kaj Diskuto Grupo.** Prezidanto, sinjoro J. Skurrie: sekretariino, fraŭlino B. Adamson. Poŝta adreso, 673 Canning-str. North Carlton, Melbourne. Kunvenejo, Temperance Hall, Russell-str. Melbourne, ĵaŭde je la sepa horo.

**Hobarta Esperanta Grupo.** Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str., ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

## Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.